

Bô Yin Râ

LA LIBRO DE KONSOLO

Dua eldono 1948
(La unua eldono aperis en 1924)

Kobersche Verlagsbuchhandlung, Bazelo

BÔ YIN RÂ
Aŭtora nomo de J. A. Schneiderfranken

El la germana originalo („Das Buch des Trostes“)
tradukis Alfred Rehfeldt

Pri sufero kaj konsolo

Vere nur tre malmultaj paŝadis tra la valoj kaj sur la altaĵoj de tiu ĉi planedo, pri kiuj oni povus diri, ke ili *neniam* bezonis *konsolon*. –

Ili certe ne estis la plej *profundanimaj* homoj, kaj certe ne estas pruvo de elstara mezuro de anima forteco, ke oni *ne* havas bezonon de konsolo. –

Same kiel profunda *maro* bezonas multe *pli longan* tempon por glatigi siajn ŝtormvipitajn ondegojn, ol malprofunda *marĉlageto*, tiel ankaŭ *riĉa, profunda animo* estas multe *pli forte* kaptata de ĉia spertado, kaj povas suferi de ĝi tre longe, dum la *malprofundaj* animoj, ĉe kiuj nenio *povas* penetri en la profundon, ĉar ili ne havas profundon *en si*, superas sian doloron de la vespero ĝis la sekvanta mateno. –

Sed bezonas *konsolon* nur *tiu* suferanto, kiun kaptis lia sufero ĝis lia plej profunda *profundo*, kaj al kiu la amaraj akvoj de l' sufero minacas fari la fontojn de lia tera feliĉo ne-trinkeblaj.

Ekzistas pli da tiaj bezonantoj de konsolo sur tiu ĉi tero, ol homoj malriĉaj je teraj havaĵoj, kaj da tiuj ĉi ja ekzistas vere sufiĉe...

Bedaŭrinde *malkaŝigas* en multaj homoj iom de ilia profundo nur en *sufurado*, ĉar en la *ĝojo*, kiu vere povas konduki al la *sama* profundo, oni kontentigas sin per la malmulto, kiun la *supraĵo* povas doni.

Certe, el la vidpunkto de pli alta ekkonado ĉiu *sufero* de tiu ĉi tera vivo devas esti rigardata kiel *mensogo* kaj trompa *ŝajno*; sed: ne ekzistas mensogo, kiu fine ne devus servi al la *vero*, kaj tiel ankaŭ la *sufero*, kiun tiu ĉi tero superabunde estigas el si mem, fine tamen devas helpi al la *ĝojo* atingi la venkon.

En tio ĉi estas entenata ĉiu forto de vera konsolo, se konsolo estu ne nur provo *persvadi* vin, ke vi forgesu la suferon. –

Se vi volas *forgesi* ĝin, ĝi tiom pli *trompos* vin kiel *mensogo*.

Sed se vi volas servigi vian suferon al la *vero*, vi certe ne celos forgesi ĝin. –

Vi kuraĝe, okulon kontraŭ okulo, staros fronte al la sufero, kiu trafis vin, kaj vi devos lerni *venki* ĝin; sed ,*venki*‘ tie ĉi ne signifas ,*forgesi*‘, kaj eĉ malpli utilus al vi, se vi evitus *senti* vian suferon, – se vi volus tiumaniere kateni *mensogon* per *mensogo*.

Vidu: la grandaj majstroj de la arto de l’ vivo neniam malbrave evitis suferon.

Ili sciis *sufери*, same kiel ili sciis doni sin al la *ĝojo*.

Ili sciis, ke ĉiu sufero fariĝas kondiĉo kaj garantiaĵo de la *ĝojo*, tuj kiam la sento de sufero estas liberigata el la *mensogo* kaj el la regno de *ŝajno*. –

Vi certe ne povas forigi la suferon el via tera vivo, sed vi povas ŝanĝi vian *sentadon* kaj tiel *senvalorigi la suferon*, ĉar ĉiu sufero estas prezentita al vi nur, por ke ĝi estu *senvalorigata* de vi. –

Nur tiel vi fariĝos *mastro* kaj *venkinto* de tera sufero, es-
tinte ties *sklavo!*

Nur tiel vi spertos la suferon en *tia* maniero, ke ĝi devas
vin *progresigi*, kvankam ĝi antaŭe minacis *neniigi* vin! –

Certe ne estas tro malfacile renkonti la suferon de tiu ĉi
tero en *tia* maniero, sed vi neniam fariĝos *mastro* de la sufero,
se vi volas eviti la *sentadon* de l' sufero! –

Nur tiu, kiu kapablas *senti* la suferon plej profunde en sia
animo, fine ankaŭ kapabliĝos *ekkoni* ĝin kiel mensogen. –

Nur tiam li scios *venki* sian suferon kaj ricevos la *konso-
lon*, kiu lumas renkonte al li el la plej interna *certeco* de ek-
konado.

Pri *tiu* sola *inda* konsolo estos parolate tie ĉi.

Mi volas montri al vi, ke vi povas ricevi ĝin en *via propra
interno* kaj tiam ne bezonas serĉi konsolon ĉe *aliuloj*.

La konsolo, kiun *aliuloj* povas doni al vi, helpos al vi li-
berigi el la katenoj de *via* sufero *nur tiam*, se ĝi montras al vi,
kiel vi *mem* povas liberigi vin, kaj tiun arton vi povos lerni el
la vortoj de tiu ĉi libro.

*

Pri la sufero

Eble trafis vin gravaj sortobatoj.

Vi sentas vin elmetita al ili kaj vidas vin sendefende ligita al potenco, kiu laŭ neeksplikebla leĝo devigas vin suferi.

Enigita en la malvasteco de malnova nesufiĉa ekkono, vi vane serĉas en vi „kulpon“, por ke vi povu rigardi tion, kio okazis al vi, kiel „kompenson“ por tiu kulpo.

Tie ĉi vi subfalis al la unua kruda trompiĝo, ĉar nenie ekzistas „venĝanto“ de via kulpo, kiu laŭ tiu malvasta opinio povus postuli de vi „kompenson“.

Certe, ĉiu *faro* portas en si neŝanĝeble difinitan *sekvon*, kaj vi neniam kapablos eviti tiun sekvon, sed ankaŭ povas trafi vin plej amara sufero, kiu *tute ne* originis el iu faro via.

Ne mem pligrandigu vian suferon per tio, ke vi preparas spacon en vi al turmentaj *pensoj*, estante ligita al la erara supozo, ke via sufero estus mildigata, se vi ekkonus en vi iun *kulpon* kiel kaŭzon de tiu sufero.

Se iu sufero trafas vin, antaŭ ĉio *ne lasu* al ĝi *tempon* por ligi vin, ĉar se ĝi jam katenis vin, vi kapablos nur per *granda* forto liberigi vin el ĝiaj katenoj. –

Tuj levu kaj starigu vin kaj serĉu iun ajn firman apogon en vi, tiel ke vi povas sukcese lukti kun tio, kio volas kateni vin!

Vi devas esti *mastro* en *vi mem* kaj ankaŭ ne devas permesi al via *sufero* turni sin *kontraŭ* tiu mastreco, kiom ajn *profunde* vi eble *sentas* vian suferon! –

Nur en *tia* memtenado vi povos *en vi mem* renkonti la *konsolon!*

Konsolo havas valoron nur kiel *kontraŭforto* por *venki* la forton de la *sufero*.

Vi certe devos atingi la *fundon* de via *sufero*, se vi volas renkonti *fortan* konsolon.

Sed jen kio tiam okazos al vi:

Sur la *fundo* de via *sufero* vi trovos la *mensogon*, kiu estas en vigla aktiveco kaj volas trompe kredigi al vi, ke ĉia lumo estingiĝis, kaj ke ĉio brila en via vivo nun malleviĝas en teruran tenebron.

Se vi *kredas* al la mensogo, ĝi fariĝas preskaŭ nekonkerebla *potenco* per via kredo.

Tiam ĝi *nutras* sin per *via* korsango, kaj vere: kvazaŭ vampiro ĝi scios eltiri el vi ĉiom da vivoforto.

Tiam vere ĉio, kio estis lumo kaj brila lumado, malleviĝos en grizan nokton.

Tial mi konsilas al vi: – estu gardema kaj *ne kedu* al la mensogo de l' *sufero!*

Rezolute turnu la dorson al ĝi, por ke ĝia meduza rigardo ne konfuzu vin, kaj ĉiam persiste diru al vi mem:

„*Ne estas vere*, ke ĉio brilanta nun subiĝis!“

„*Ne estas vere*, ke al mi ĉiu lumo nun estingiĝis!“

„*Ne estas vere*, ke la *sufero* iam povus engluti la ĝojon!“

Sed antaŭ ĉio diru al vi, ke tiu ĉi doloro, kiu ŝajnas al vi tiom neeltenebla, tenas vin ligita nur tial, ĉar vi ankoraŭ ne

povas vidi la *veron*, kiun tiu *mensogo* kaŝas al vi sur la fundo de ĉiu sufero! –

Ju pli rezolute vi *forturnas* vin de la moka rikano de l' mensogo, des pli baldaŭ povas videbliĝi al vi, en sia radiantanta *grandeco*, la *vero* kiu staras malantaŭ via doloro! –

Kiu ekvidas ĝin, tiu ankaŭ fariĝas *mastro* de la plej acerba sufero, ĉar li tuj ekkonas, ke ĉiu sufero devas *disfali*, kiam ĝia tempo estas finita. –

Ĉiu sufero estas *pasema*, kaj nur vi *mem* povas doni al ĝi *pli longan* daŭron, ol ĝi posedas laŭ sia naturo. –

Sed ĉiu *sufero* estas mistera antaŭsigno de venonta *ĝojo*, kvankam ŝajnas al vi fia *mokegado*, se oni tiumaniere montras al vi, en la lumo de la *vero*, la suferon kiu ronĝas vin. –

Vi ankoraŭ estas tro alligita al la *mensogo* de la sufero, kaj ĝi instruas vin *flegi* vian suferon, tiel ke vi iom indigniĝas, se oni volas montri al vi la *ĝojon*, kiu estas *daŭra* tiel same, kiel ĉiu *sufero* estas *pasema*. –

Vi ankoraŭ aŭdas la laŭtan lamentadon de viaj sensoj, estas ankoraŭ ne mastro de la plendado, kiu furiozas tra viaj *pensoj*. –

Vi konstante formas al vi *imagobildojn* de tio, kio iam *estis*, antaŭ ol via sufero kurbigis vin, tiel ke vi vere ne povas ekkoni tion, kio nun fariĝis *estanteco*, kaj ke nur tio *perdita* gigantiĝas antaŭ via rigardo. –

Sed via sufero – kiom ajn peza ĝi estas – povas fariĝi *beno* al vi, same kiel ĝi alportos al vi nur novan *malfeliĉon*, se vi ne scias subigi ĝin al *via* regado...

Nur vi *mem* decidias, kio elkresku al vi el la semo de la sufero! –

Nur se vi *ĉesos retrorigardi* kaj vidos *ĉiun* taskon *antaŭ* vi, vi rikoltos la *benon* de la sufero! –

Via sorto *atendas* ion de vi, *ĉiufoje* kiam *ĝi* kondukas vin tra *sufero!* –

Ĉiu spertado de sufero estas fino kaj nova komenco.

Se vi restas tro longe *ĉe* la *fino*, vi lamigas vian plej bonan *forton*, kiu devis servi al vi por nove *komenci!*

Mi vere ne apartenas al tiuj homoj, kiuj ŝatas teni vin en la erara kredo, ke la sufero sur tiu *ĉi* tero „originas el la volo de Dio“ kaj ke *ĝi*, eĉ en siaj plej teruraj formoj, estas fera neceseco.

Anstataŭe mi povas diri al vi, ke la plej multa sufero sur tiu *ĉi* tero povus *malaperi*, se la homo ne plu *atendus* la suferon.

Sed neniam tiu *ĉi* tero estos *plene* sensufera.

Ne atendu la suferon, kaj *ne* intence *altiru* *ĝin* per via *timo* antaŭ *ĝi*, sed kiam *ĝi* *trafiŝ* vin, vi sciu, ke via vivo celas iumaniere konduki vin *supren*.

Ne baru al vi *mem* la vojon per tio, ke vi direktas viajn rigardojn *malalten*, sed rigardu *alten* – super vin – kaj tiel lernu ekkoni, kion via vivo havas ankoraŭ por *postuli* de vi, anstataŭ ke vi *mem* konstante metas *postulojn* al *via vivo*, kiuj pleje montriĝas „*rajtigataj*“ nur el la malvasteco de via terkatenta rigardo! –

El la *ekkono* de tio, kion via vivo *postulas* de vi, kiam *ĝi* igas vin renkonti suferon, doniĝos al vi la forto de l' *konsolo*,

kiun forton vi serĉas vane, dum vi direktas viajn rigardojn *re-*
turne.

Pri diversaj malsaĝaĵoj

Ne fosu en via doloro kaj ne ŝire malfermu cikatriĝantajn vundojn ĉiam denove, se vi volas akiri la *forton de l' konsolo* en vi *mem!*

Foririgu ĉiun, kiu venas por „konsoli“ vin kaj ne scias fari ion pli bonan ol skrape malfermi freŝajn tombojn!

Kion vi *spertis*, tio volas trovi *trankvilon* en vi, por ke ĝi malleviĝu en vian plej profundan profundon.

Nur kiam ĝi neperdeble ripozas en la profundo de via animo, ĝi fariĝas al vi vivogeneranta gajno.

Ĉiu sufero estas potenca nur tiom longe, dum vi *flegas* ĝin kaj volonte *agnoskas* ĝian mastrecon! –

Kiam vi, *sentinte* kaj *suferinte* ĝin, ĉesas *koncedi* al ĝi *potencon* super vi, tiam ĝia potenco estas *finita!*

Tial ĝi provas ree kaj ree memoriĝi vin pri si!

Kiel ĉio pasema ĝi deziras resti *pli longe* en potenco kaj efiko, ol la tempo atribuita al ĝi tion permesas. –

Por tio ĝi bezonas *vin*, ĉar sen vi ĝi ne *estas!*

Por gajni vian *estimom*, ĝi ĉiam elektas la plej bonajn maskojn...

Kiom ĝi nebuligis la homajn cerbojn en ĉiuj tempoj, por esti rigardata de ili kiel *sendito de dioj*, eĉ kiel atesto de dia *amo!* –

Tiel oni eĉ komencis *ami* ĝin, ne suspektante, ke – laŭ imanenta leĝo de la fortoj de tiu ĉi universo – oni per tiu amo *plimultigis* la suferon sur la tero...

Sed ekzistas *nevideblaj potencoj* en tiu ĉi kosmo de fortoj, potencoj kiuj havas *plej grandan* intereson pri tio, ke la homo de la tero *suferu*, ĉar ili *nutras* kaj *renovigas* sin el la fortoj de l' homo, kaj ĉar la homo neniam estas tiom preta *cedi* siajn fortojn al ili, ol kiam li troviĝas en *sufero*. –

Ju pli lia sufero – kiu komence estas sentado kiun li *mem ankoraŭ regas* – fariĝas lia *reganto* kaj *tirano*, des pli facile tiuj nevideblaj estaĵoj povas forpreni liajn fortojn, kiujn ili bezonas.

Tial ili uzas ĉion, super kio ili havas potencon, por *teni* lin en lia sufero tiom longe kiom eble...

Ne vane oni diras pri iu, kiu longe suferis: – lia sufero „*senfortigis*“ lin.

Vere, oni plej lerte *elsuĉis* liajn fortojn, dum li preskaŭ *ĝue flegis* sian suferon kaj donis al ĝi la plej belajn nomojn, por altigi ĝin al la nivelo de *sankteco* kaj plene senti sin en la *potenco* de sia sufero. –

Tiel la homo *mem* transdonas sin kiel predon al tiuj lupfantomoj kaj vampiroj de la nevidebla mondo de sideraj fortoj. –

Se tio finfine ĉesu, oni devas, estante konscia pri la reala okazado, forigi el sia animo ĉiun *voluptan plezuron* al sufero, kaj tiu „plezuro“ ekzistas *pli* en ĉiu sufero, ol la plej multaj suferantoj *suspektas*.

Certe ne ekzistas „deziro“ *veni* en suferon.

Ankaŭ en la sentado de sufero, kiun la homo ankoraŭ povas *regi*, vere *ne* estas „volupta plezuro“.

Sed tuj kiam la sufero *superas* la homon, tiel ke li *volas* suferi *plue*, li sekvas, eĉ se li tute ne tion *ekkonas* kaj povus *konfesi*, obtuzan *volupton*, kiu instigas lin ĉiam denove ŝire malfermi siajn vundojn, por ke la nevidebluloj povu ĝui lian sangon, nutrante sin de liaj fortoj kvazaŭ naŭzigaj parazitaj.

De ili oni devas liberigi sin, kaj kvankam la sufero *neniam malaperos* de sur tiu ĉi tero, ĝi tiumaniere povas esti *limigata al la minimumo*, kiun la leĝoj de tiu ĉi ekstera fenomeno devas esti kiel nepran sekvon.

Ĉio, kio *transpasas* tiun sekvon – ĉio, kio kuŝas *ekster* tiu sekvo rezultanta el „laŭnature necesa“ okazado – iom post iom povas esti *forigata* el la vivo de la homoj, kaj *estos* forigata en la vivo de ĉiu individua homo, se ĉiu ekkonas por si mem, ke li nur oferas sin mem al la nevideblaj malbonfaruloj, dum li restas ligita al la erara kredo, kiu de antaŭ jarmiloj *proklamas sankta* la suferon de la tero. –

Sed oni ne misinterpretu miajn vortojn!

Mi certe havas en mi solenan *respekton* antaŭ ĉiu suferanto, kiu portas la suferon trafintan lin kun alta homa digno, dum li *devas* porti ĝin, por tiam *venki* ĝin kaj trovi en si la fortan *konsolon*, kiu vokas lin al nova plialtigita vivo, kaj kiu ne povas esti donata per iu „konsolado“ venanta de *ekstere*.

Sed mi avertas kontraŭ tio, ke oni *sin donas* al la sufero, kaj kontraŭ la terura *eraro*, kiu rigardas la suferon kiel ion „*sanktan*“ aŭ „*originintan el la volo de Dio*“, dum ĉiu sufero estas nur *mensogo* kaj *malbono* – kaj eĉ tie nur necesa *neperfektaĵo*, kie ĝi *devas* esti tolerata kiel neevitebla sekvo de la leĝoj de tiu ĉi tera fenomeno. –

Laŭ mia opinio temas pri nekonscia kruda *blasfemio*, se oni aŭdacas egaligi eternan „*Dion*“, pri kiu estas dirite, ke li

estas la *amo*, al la nevideblaj *vampiroj*, kiuj en la ĉirkaŭa regiono de tiu ĉi tero nutras sin per la fortoj de l' homo, – dirante:

„Kiun la Eternulo amas, tiun li punkorektas.“ –

Se la *malsaĝaĵo* de saĝulo ne estus la patro de tiu parolo, tiam oni devus nomi ĝin *krimo kontraŭ la homaro!* –

Sed rilate al siaj *efikoj* ĝi certe ne estas io alia, kaj tiuj nevidebluloj, kiuj iam sukcesis enblovi ĝin en homan cerbon, bone zorgis pri tio, ke el la malsaĝaĵo, kiu akceptis ĝin, *fariĝu* daŭre pluiranta krimo ...

Kiu ne volas kulpigi sin pri la *malfeliĉo*, kiu jam *naskiĝis* kaj ankoraŭ *povas* naskiĝi, ĉar ĝi igas la homon de tiu ĉi tero *ami* kaj *flegi* la malbonon, tiu kuraĝe kaj kun digno portu la suferon, kiun li *devas* porti, ĝis li *superis* ĝin, sed li ne arogu al si – forlogite de tio, ke la maniero, *kiel* li portas ĝin, povas rezultigi lian *puriĝon* kaj *maturiĝon* – revalorigi *la malbonon mem* kiel sortecan okazigon „originintan el la volo de Dio“! –

Ne estas „sorteca okazigo“, sed la *rezulto* de neŝanĝeblaj aroj da sinsekvaj okazaĵoj en tiu ĉi tera fenomenaj mondo, se ne temas pri tio, ke oni nekonscie *altiras* kaj plimultigas ion per la forto de la *kredo* pri ties „origino el la volo de Dio“ kaj „sankteco“.

Ĉu vi nuntempe suferas aŭ estas libera de sufero – diru al vi en ĉiu el viaj tagoj:

„Ĉiu sufero estas *malbono*, kiun *mi* devas *venki!*“

„Ĉiu sufero estas *malbono*, kaj mi petas en la *spirito*, ke mi trovu *gardon* kontraŭ ĝi, kiom la intersekvado de teraj okazaĵoj tion permesas!“

„Ĉiu sufero estas *malbono*, kaj mi ne volas *kreskigi* la malbonon sur la tero, ĉu per mia *timo*, kiu *altiras* ĝin, ĉu per mia *kredo* je ĝia laŭsupoze *sanktiganta* forto!“

Same kiel *ĉio*, kion vi devas sperti, povas doni al vi la okazon *elmontri vian firmecon* en via spertado, tiel ankaŭ la *sufero*; sed vi certe neniam trovis homon, kiu en *alia* spertado *ne* montris sian firmecon kaj tiam en sufero subite montris *grandecon*.

Se tio tamen ŝajnis al vi, vi *antaŭe* certe *mistaksis* la spertadon de tiu homo!

Sed vi neniam forgesu, ke *ĉiu* spertado povas progresigi la homon, kaj mi tie ĉi ne diras, ke dum spertado de *sufero* neniu *povas* esti progresigata, – sed estas ne la *sufero*, kiu progresigas lin, sed la *teniĝo* de l' homo rilate lian spertadon, teniĝo kiu *ankaŭ en sufero* povas montri, kio en li havas *veran valoron*.

La multe laŭdata „*lerniga vojo de sufero*“ certe *rompis* iun aŭ alian fieran homan spiriton, tiel ke li humiliĝis, sed oni ne *blindigu* sin mem kaj unue *esploru*, ĉu tiu lernigo vere kondukis la homon al lia *plej alta disvolviĝo*, aŭ ĉu li fariĝis nur *laca*, *cedema* kaj tiom *disbatita*, ke li ne plus povis *levi* sin kun alta kuraĝo. –

Tre ofte, *laca rezignemo* aperos al vi kiel nekomprenebla *boneco*, kie ies *volo* nur *disrompiĝis* en sufero – kie ĉiu deziro *perdis sian movoforton* – kie, rezulte de la nekapablo *venki* la suferon, ĉiu tera valoro estis *senvolorigata*...

Suspektindaj estu al vi ĉiuj, kiuj laŭdire nur per la *sufero* fariĝis „*pli bonaj homoj*“!

Aŭ ili jam *antaŭe* estis *multe pli bonaj*, ol vi supozis, sekve *komprenis* la postulon de la sorto kaj transpaŝis *super la sufero* al nova komenco, aŭ vi vidas *disrompitojn*, kies laca, cedema gesto nun aspektas kiel „boneco“. –

La homoj, kiuj spertas la suferon ĝis ties fundo, kaj tuj levas sin por *venki* la suferon – rigardante alten super sin mem kaj kuraĝe paŝante renkonte al *nova komenco*, – ofte ŝajnos al vi *apenaŭ tuŝitaj de la sufero*, kaj tamen estas ili, al kiuj, antaŭ ĉiuj aliaj, kreskas *beno* el la sufero. –

Ili estas la homoj, kiuj trovas la forton de l' *konsolo* en *si mem* kaj malkaŝas ĝin por si mem en sia *agado*. –

Ili apenaŭ subfalos al la *malsaĝo*, rigardi la *sufieron*, kiu trafis ilin, kiel pruvon de la *amo de l' ĉielo*. –

*

Pri la konsola forto de la laboro

Malriĉa – vere *malriĉa kiel almozulo*, eĉ se li disponus ĉiujn trezorojn de la tero – estas tiu, kiu ne konas la neelĉerpeblan *eblon plialtigi* ĉiujn siajn fortojn, kiu estas donita al li en la kapablo *labori*. –

Ekzistas tre *diversaj* laboroj sur tiu ĉi tero, kaj multaj homoj probable opinias, ke ilia laboro devas servi al *sublima afero*, por ke ĝi tiumaniere progresigu iliajn plej altajn fortojn.

Kiu tion opinias, tiu ankoraŭ *ne konas* la „benon de laboro“ kaj tre erare interpretus tion, kion mi havas por diri al li...

Mi *ne* parolas pri tio, ke tiu aŭ alia laboro povas alporti al vi apartan *ĝojon*, kvankam mi certe deziras al vi ĉiun *ĝojon* pri via laboro.

Mi ankaŭ *ne* parolas pri tio, ke laboro pri afero, kiun vi rigardas kiel „subliman“, povas altigi vian *sentadon*.

Krome, tie ĉi *eraro* estas tuj korektenda.

– Vi vidas homon dediĉi sin al sublima laboro, dum vi mem eble laboras kontraŭ taga salajro, plenumante devon de la ĉiutaga vivo, ĉu per viaj *manoj* aŭ per via *kapo*.

Eble vi milde sentas ion similan al *envio*, ĉar via ekstera sorto aŭ viaj talento kaj edukado ne ebligis al vi la saman faradon, kiun vi sentas „sublima“. –

Sed vi havas *neniun kaŭzon* por envii la alian.

Vi mem – kia ajn estas via laboro – *partoprenas* en lia fardo. –

La *portisto*, kiu en haveno malŝarĝas ŝipojn, partoprenas en ĉio granda kaj signifoplena, kion lia popolo estigas per unu el siaj idoj, same kiel la *laboristo* je la maŝino, kiu transformas tiujn ŝarĝojn el fremdaj landoj en nutraĵon kaj vestaĵon.

La *kampano* malantaŭ la plugilo kaj la *skribisto* je la pupitro: – *ĉiuj* estas unuigitaj en laboro kun *aliulo*, en kies cerbo jam kuŝas preparita la malkovraĵo, kiu alportu sanigon al malsanuloj, aŭ kun aliulo, kiu cerbumas super esplora laboro, kies rezulto estos por la bono de *ĉiuj* samtempuloj kaj posteuloj.

La „aliulo“ estus tre malsaĝa, se li opinius, ke li *sola* staras malantaŭ sia verko...

Certe, kiel *poeto*, *artista*, kiel mastro de sia *scienco*, li estas la *kreinto* de sia verko, sed lia laboro estas *ebligata* nur per la *laboro de ĉiuj*, kiuj estas necesaj, por ke rezultu la *vivokondiĉoj*, kiujn la kreanto nepre bezonas. –

Mi iam aŭdis pri homoj de malgranda komunumo, kiuj opiniis, ke ili povis trovi la savon, se ili senigis sin je ĉio, kio ne estis farita per iliaj propraj manoj.

Tiel la noblaj entuziasmoj strebis „returne al la naturo“ kaj setlis en solejo.

Nur *unu aferon* ili ne volis malhavi: – *librojn*, – kaj ankoraŭ alian aferon: belegan *pianon*, sur kiu alttalentulo inter ili povis aŭdigi verkojn de la muziko.

En tiu maniero ili absurdigis sian propran evangelion, kaj estas strange, ke ili mem ne *rimarkis* tion.

Oni pripensu dum nur kelkaj minutoj, kiom da diversaj laboroj de multaj homoj estas necesaj por fari nur la *materiaĵon*, kiu konsistigas *libron*, kaj kiom da manoj kaj maŝinoj estas bezonataj por fari sonriĉan *pianon!* –

Mi deflankiĝante menciis tiun ĉi sperton tial, ĉar ĝi klare evidentigas, kiel ĉiuj altaj spiritaj valoroj, kiujn kulturo povas krei kaj peri, estas ĉiam kondiĉataj de la *ĉiutaga laboro* de sennombraj manoj kaj kapoj.

Kiom ajn *ĉiutageca* la farado de homo ŝajnas al li mem, li tamen povas esti certa, ke ĝi per iu ĉirkaŭvojo montriĝas en la *plej altaj verkoj* de samtempuloj, kaj, inverse, la verkoj de la *kreemaj* homoj – kiom ajn malproksimaj de ĉia ĉiutageca zorgo ili eble ŝajnas – estas la sola *garantio* por tio, ke kultura rondo *konserviĝas* kaj povas prezenti bone salajritan *laboron* al ĉiuj, eĉ al la plej malgrandaj. –

Post kiam konsekvenciĉa eraro estis forigata, estu nun parolate pri la grava *forto de la animo*, kiun oni povas akiri per ĉiu speco de laboro, sed *nur*, se ĝi estas farata en la plej *intensa* maniero, – forto, kiu en ĉiu *sufero* pligrandigas ankaŭ la forton de la vera interna *konsolo*.

Vi certe scias laŭsperte, ke la sola neceseco okupi vin pri la aferoj, kiuj povas sekvi vian suferon, direktas vin for de amara memturmentado, revenigas vin *al vi mem*, kaj tiel kapabligas vin rigardi tion, kio trafis vin, en pli trankvila maniero.

Sed se vi volas ricevi la fortan *konsolon en vi mem*, tiam estas necese antaŭ ĉio, ke viaj *pensoj* ne konstante konvulsie okupiĝu pri via doloro.

Vi *plej sekure kaj plej facile* preventos tion, se vi tiom enprofundigas vin en vian *laboron*, ke dum via labortempo nenio alia ol via laboro povas veni en vian konscion.

En sufero, la tempo de via laboro – se vi scias labori ĝuste – estas ĉiam tempo de liberiĝo de turmentaj pensoj, tempo de refortiĝo.

Sed kiu kredas, ke li *laboras* per la kapo aŭ la manoj, dum li preskaŭ laŭkutime *pensas pri aliaj aferoj*, por tiu miaj vortoj *ne* estas skribitaj, kaj mi tre dubas, ke li *bezonas* konsolon, escepte se li serĉas „konsolon“ siamaniere en „forgeso“ de la sufero...

Mi tie ĉi parolas al homoj, kiuj sentas la suferon en ĝia *profundo* kaj volas *venki* ĝin!

Nenio alportas al vi pli baldaŭ la internan konsolon, kiu montriĝas al vi kiel *forto*, kaj instruas al vi per ĝia helpo *venki* eĉ la plej acerbajn suferon, ol *laboro*, kiun vi faras *tiel*, kiel ĉiu laboro estu farata, se ĝi progresigu vian animon!

Nenio kondukas vin pli baldaŭ al *nova komenco*!

Ĉar mi vidas en vi homon strebantajn al la *spirito*, estas al mi evidente, ke povas ekzisti por vi neniu kiom ajn „mekanika“ laboro, kiu permesas al vi – simile al maljunaj bravaj virinoj, kiam ili trikas ŝtrumpojn, kio por ili estas pli *ludo per la manoj* kaj postulas atenton *nur de tempo al tempo* – pensi samtempe pri *aliaj aferoj*, kuŝantaj *ekstere* de via laboro. –

Krome, mi devas atendi de vi, kiu volas ekiri sur la vojon al la *spirito*, ke vi eĉ ne faru *paŭzon* en via laboro, escepte se vera *laciĝo* devigas vin al tio. –

Nur *tia* laboro alportas la *animan progresigon*, kiun vi *bezonas* sur via vojo – ĝi krome faros vin la plej kapabla inter viaj laborkunuloj –, kaj ankaŭ en via sufero *tia* laboro malfermos al vi en vi mem la *forton de konsolo*. –

Kiu konas *tian* specon de *laboro*, tiu *sola* ankaŭ havas la *rajton ripoz*i post farita laboro, sed ankaŭ lia *ripozo* estos fruktodona al li, ĉar tiam la frukto de la laboro de *aliaj* homoj estas prezentataj al li per mensaj influoj, laŭ lia enprenkapablo. –

Kiam vi estas en *sufero* kaj provas atingi la *forton de konsolo* per via *laboro*, simile doniĝos al vi *poste*, dum via *ripozo*, granda *konsolo* en via interno, konsolo kiu originas el la *spirita* flanko, kaj kiun vi *kapablas* ricevi *nur* en la stato de ekvilibro reestigita per la *laboro*. –

Mi mem povus raporti sufiĉe pri *sufero* kaj pri *laboro* ekde mia infaneco, kaj parolas al vi kiel unu, kiu havas abundan konon pri ambaŭ. –

Vi povus fidi min, eĉ se mi havus neniun alian rajton instrui. –

Jam kiel infano mi spertis diversajn suferojn, kaj mi poste estis kondukata sur *ĉiuj* vojoj, kun kiuj mi devis konatiĝi, por povi hodiaŭ helpi tie, kie povas esti helpate per *instruo*.

Ekzistas granda *laceco* en la mondo en tiuj ĉi tagoj de postvibrantaj teruroj, kaj oni ankoraŭ ne komprenas, ke an-

kaŭ tiu ĉi laceco estas venkebla nur per *laboro pro la laboro*.—

Ankaŭ *tie*, granda *konsolo* estas atingebla en la propra interno nur per la mirakle regeneranta forto de la plej intensa *laboro*. —

Mi vere ne postulas „kredon“ je tiuj ĉi vortoj!

Kiu estas en *sufero* aŭ laciĝis de siaj ŝarĝo kaj zorgo, tiu faru la *provon!*

Li ne bezonas longe atendi por vidi, ĉu mi parolis la *veron*. —

La *forto de konsolo* venos al li el la laboro pli frue ol li supozas, kaj faros lin forta kaj senŝarĝa por *nova komenco!* —

*

Pri la konsolo de funebrantoj

Levu vian kapon, vi, kiu *funebbras* pro homo, kiu estis kaj estas *kara* al via animo, kaj kiun vi devis *enterigi!*

Vi *patrino*, kiu perdis vian *infanon*, vi *patro*, de kiu la *filo* estis forŝirata, kiam li jam estis fariĝinta via amiko, vi, kiu devis akompani la ĉerkon de la *patro*, de la *patrino* al la tombejo!

Bone estas al vi, se la instruoj, donitaj al vi en via infaneco, estigis tian kredon en vi, ke ĝi ankoraŭ nun povas subteni vin!

Oni diris al vi, ke la animo iras al *Dio* en sian *gloron*, kaj ke eĉ la surtera *korpo* iam spertas sian *releviĝon*...

Se vi *kredas* tion: – kial mi povas vidi vin en senkonsola *funebro?!*

Mi *kunsentas* kun vi kaj *scias*, kion vi perdis por la daŭro de tiu ĉi surtera vivo.

Vi vere havas *kaŭzon* por lamenti, kaj mi *scias* pri via granda *doloro*...

Sed vidu: – laŭ la instruo de via kredo la morto *perdis* la venkon!

Estas nur mallonga apartigo, kiun vi priploras, kaj se vi staras vere firme en via kredo, vi samtempe interne *ĝojegos* ĉe la imago, ke tiu via kara, liberigita de ĉiu tera sufero, *vivas en beata transfiguriĝo inter la beatuloj*. –

Bone estas al vi, se vi *vere* kredas tiumaniere kaj nenio povas iam igi vin dubi pri via kredo!

Redonu al la doloro la proprajon de l' doloro, kaj priploration, kion vi por la cetera daŭro de via tera vivo povas ne plu *vidi*, ne plu *aŭdi*, ne plu *senti*! –

Vi havas *kaŭzon* por plori, ĉar vi devas postresti tie ĉi, kaj dum tiu ĉi surtera vivo vi plu nenie trovas tion, kion vi amas!–

Sed kiam estos veninta *via* lasta tago, *tiam* – diras via kredo al vi – vi *revidos* tion, kion vi perdis por certa tempo, kaj tiam via *ĝojo* estos senfina...

Bone estas al vi, se vi kredas tion!

Viaj larmoj baldaŭ ĉesos flui, kaj vi trovos ĉiun *konsolon* en via *kredo*!

Sed mi trovis *multajn*, kiuj asertis, ke ili havis tiun kredon, kaj tamen ne kapablis regi sin en sia funebro. –

Mi trovis *multajn*, kiuj *kredis* per la lipoj kaj sentis en sia koro, ke ili *mensogis* pri tiu kredo, ĉar iam *konvencio* postulis, ke oni ekstere konfesu tiun kredon.

Supermultajn mi trovis, kiuj tute ne kaŝis, ke tiu kredo estas por ili plu nenio alia ol pia fabelo. –

Inter *tiuj ĉi* mi trovis la *plej multajn*, kiuj *bezonis* konsolforton en si mem kaj kiuj ankaŭ sciis *trovi* konsolon en si, kiam oni montris al ili la *ĝustajn* vojojn...

Iam iu el ili diris al mi:

„Kial oni instruas al ni tiujn ĉi aferojn, kiuj entenas la *veron* en si, kiel oni instruas *infanajn fabelojn*, tiel ke ni *devas perdi* ilin, kiam ni forlasis la aĝon, en kiu ni kredis fabelojn?“

Al li mi diris:

„Ne ekscitiĝu kontraŭ tiuj, kiuj iam instruis vin tiel, kiel ili *sciis* instrui, sed zorgu mem, ke vi scias instrui *ion alian*.“

Vere, la malnovaj kredinstruoj povas doni bonan *konso-*
lon, kaj kiu ankoraŭ *povas* kredi je ili, tiu finfine certe ne estas trompita, eĉ se la *imagoj*, kiujn tiu kredo kreas al si, *ne* tute konformas al la *realo*. –

Sed ili tamen ebligas *suspekti* la veron: – montras, ke la mortema tera korpo estis nur *portempa esprimformo* de estaĵo, kiu *ne* estas el ĉi tiu tera mondo kaj tial restas perceptebla por teraj sensoj nur *tiom longe*, dum ĝi manifestiĝas en *sense perceptebla formo*, kiu originas el tiu ĉi tero.

Certe estas malsaĝe, se oni nutras la kredon, ke iam estiĝos nova *korpo* el la *sama* substanco, kiu estas perceptebla al la *teraj sensoj*, sed ankaŭ *tiu ĉi* instruo entenas la *veron*: ke la nepereonta *spirita* formo de la homo konformas al lia antaŭa *tera* manifestiĝa formo, ĉar, dum lia surtera vivo, *tio lia spirita* povis pli aŭ malpli enstampi siajn trajtojn en lia tera formo.–

Estas ankaŭ *vero*, ke tiuj surtere apartigitaj per la morto iam „*revidos*“ sin; kaj en sia *spirita* formo ili rekonos unu la alian kun multe pli granda certeco, ol ekzemple homoj vivantaj en la tera korpo, kiuj dum kelkaj jaroj ne vidis sin reciproke.

Sed tute *erara* estas la imago, kvazaŭ tio spirita de l' homo, tuj post kiam ĝi forlasis la teran korpon, eniras en ĉiujn „*ĝojojn de la ĉielo*“ aŭ povas fali en staton de *eterna*, horra *turmento*, el kiu ĝi ne plu povas esti savata. –

Tiu ĉi *lasta* imago entenas spuron de la vero, ĉar naturoj tute *animaliĝintaj* kaj ligitaj nur al *tio tera* povas resti en anima mallumo dum eonoj, antaŭ ol ili fariĝas taŭgaj por vidi animan-spirititan *lumon*.

Sed ankaŭ ĉi tie la leĝo de la *spirito*, kies vivo estas *amo*, estas senfine pli milda ol la senkompateco de la homa juĝo, kaj kiu postlasis *amon* sur la tero, tiu *neniam* povas subfali al tiu eonlonga vualiĝo, kiom ajn erarema li estis. –

En mia „*Libro pri la Transa Mondo*“ mi detale parolis pri la stato, en kiu troviĝas tio spirita de l' homo post lia morto, kaj tie, kiel en multaj aliaj de miaj libroj, mi ankaŭ diris, de kie doniĝis al mi la *certeco*, kun kiu mi povas paroli pri tiuj ĉi aferoj.

Sufiĉu diri ĉi tie, ke tiu certeco originas el plej sekura *sperto*, kiom ajn malsaĝa kaj aroganta eble ŝajnas al homoj de tiu ĉi tempo en la okcidenta mondo, se oni diras al ili, ke ekzistas sur la tero homoj, kiuj estas *kapablaj* kolekti *sperton* en tiu rilato, *sperton*, kiu estas alirebla nur por *tre* malmultaj homoj. –

Rilate al la stato de konscio, en kiu troviĝas *formortinto*, estu dirate tie ĉi, ke li unue vekiĝas en *malalta* spirita regiono, kiu estas ankoraŭ tre proksima al tiu ĉi tero.

Se li jam estas spirite preparita per sia surtera vivo, li tuj poste forlasis tiun malaltan regionon gvidate de kondukantoj,

kiuj iam vivis sur la *tero* kiel li, aŭ *neniam* portis teran korpon.

Dum sia migrado pli alten, kiu ne plu estas kalkulebla per la *tera* nocio pri tempo, li tiam renkontas ankaŭ helpantojn, kiuj spirite agadas sur la *tero* ankoraŭ en *tera korpo*, sed *tie* en la spirita regiono ĉeestas en sia *spirita formo*, kaj li estas kondukata de *ili* plu kaj plu, al ĉiam pli luma ekkonado kaj sentado de la spirita vivo. –

Tio estas la vojo de homa spirito, kiu *dum* sia *surtera vivo* spirite lernigis al si mem, *en amo kaj agado kaj per laboro je si mem*, *ekkoni* antaŭe *nekonatan* realon en ĝia esenco, kaj *sekvi tiujn*, *kiuj solaj povas tie plukonduki lin*. –

Sed la plej multaj el tiuj, kiuj ĉiutempe forlasas la teron, sentas sin – ekkoninte, ke ili *havas formon* kaj *konscion* kaj estas *kapablaj agi* – sufiĉe *bone* en la *malaltaj* spiritaj interregnoj kaj *tie* provas *trovi* tion, kio konformas al iliaj *imagoj*. –

Ĉar tie ĉi, kiel en sonĝo, la *imago* ŝajnas esti *realo*, ili estas fascinitaj de ilia memkreita mondo, kaj ili ne aŭskultas la voĉon de tiuj, kiuj povus konduki ilin *pli alten*, same kiel sonĝanto en profunda dormo ofte ne vekigis, eĉ kiam proksime de li voĉoj estas aŭdeblaj.

Ĉar ankaŭ la spirito de *homo konscia pri sia kulpo* ĉiam konas kaŭzojn, kiuj ŝajnigas lin tia, ke li povas *pardon* sin antaŭ si mem, li tre baldaŭ sukcesas venki imagojn, kiuj *unue* konformis al lia *timo* antaŭ eterna „*puno*“ aŭ *turmenta purigo*, kaj tiam vidas „*ĉielan regnon*“, en kiu li trovas ĉion ekzakte tia, kia ĝi respondas al lia *tera imago* laŭ lia kredo. –

Sed kiu dum sia tera vivo kredis, ke post la morto de lia korpo lia vivo estos finita, tiu kreas al si samamane imagojn de *tereca* pluvivado, kaj *ĉiu* el tiuj, kiuj partoprenas en la kreado de tiaj „bordaj regnoj“, estas *feliĉa* laŭ sia maniero, ĝis iom post iom venas ankaŭ por li la *vekiĝo* kaj li *travidas* la mondon de *ŝajna* plenumiĝo, mondon reve imagitan de li kune kun aliaj, same kiel surtere homo vekiginta el nokta dormo *travidas* la sonĝon kreitan de li sola. –

Nur *tiam* li estas matura por aŭdi la *voĉon de la helpanto* kaj ekpreni lian manon, por ekiri sur la vojo en la *pli altajn* spiritajn mondojn, konscie laborante je si mem, de ŝtupo al ŝtupo, pli kaj pli proksimiĝante al la esenca *lumo* de l' spirito, fortiĝante en *amo* kaj altirate de la *prafonto de la amo*. –

Sed se homa spirito, kiu volis manifestiĝi sur la tero, trovis manifestiĝon nur en korpo de *infano*, kaj se tiu infano vivis surtere tiom longe, ke la unuiĝo de ĝia spirito kun la animoelementoj donitaj al ĝi povis okazi, tiam li certe estas konscia pri si mem, sed ankoraŭ *ne havas* la kapablon krei al si *mondon de imagoj* el teraj rememoroj, aŭ posedas tiun kapablon en tiom malgranda mezuro, ke li tamen *ne* subfalas al la *kolektiva sonĝo de ŝajna beateco*, kiu ĉe plenkreskuloj ofte povas daŭri tre longan tempon.

Tiam la spiritaj helpantoj *tuj* ekprenas lian manon kaj *kondukas lin pli alten*, kaj kvankam li bezonas multe *pli longan* tempon por supreniri siajn ŝtupojn, ĉar mankas al li spirita *sperto* surtere kolektita, li kompanse estas *tuj de la komenco* en la *luma vero* kaj en la *mano de la fidindaj gvidantoj*. –

„*Revido*“ kaj rekono povas okazi nur tiam, se oni *neniam eniris* la sferon de „bordaj regnoj“ de *reve imagita plenu-*

miĝo, escepte kiel rapide tramigrendan landon, aŭ post kiam la *vekiĝo* el la tiel reve imagita „beateco“ jam okazis kaj oni konscie eniris, je la mano de la gvidanto, *pli altajn* spiritajn mondojn.

Tiam „revido“ estas *ĉiutempe* ebla inter ĉiuj, kiuj reciproke *konis* sin dum sia surtera vivo aŭ nur *sciis pri si reciproke*, kondiĉe ke *simpatio* ligis ilin, eĉ se ili estas atingintaj tre *difference* altajn ŝtupojn de sia disvolviĝo. –

La infano, kiun la patrino tie ĉi perdis en ties juna aĝo, montros sin al ŝi *unue* en la formo, en kiu ŝi *konis* ĝin, kaj tiam *ŝanĝiĝos* antaŭ ŝiaj okuloj en la *spiritan formon*, kiun ĝi *daŭre* posedas...

Same, ĉiu vidos la alian *unue* tiel, kiel respondis al lia *surtera formo*, kaj tiam vidos lin en lia *restonta spirita* formo, ĉar la substanco, kiu *portas* la spiritan konscion, adaptiĝas al ĉiu imago, kiun la konscio de la homa spirito povas havi pri si, tiel ke ekzemple homo, kiu surtere naskiĝis en kripla formo, unue *montriĝas* al tiuj lin revidantaj en la sama *formo*, en kiu ili *sole* povas *imagi* lin, kaj poste tuj forlasas tiun nun maladekvatan formon kaj sin montras kiel la saman estaĵon en sia *perfekta* spirita formo. –

Ĉiuj ĉi aferoj sonas kiel rakontoj en fabelaroj kaj tamen fidele konformas kun la *realo*, same kiel se mi devus priskribi tie ĉi kelkajn *terajn* fenomenojn, kiujn vi konas tiom bone, ke vi tuj rekonas ilin. –

Eble vi povas demandi vin, ĉu iu aŭ alia fabela imago montras *supren en la prahejmlandon de la homo*, eĉ se la aŭtoroj de la fabelo nur *nekonscie suspektis* ĝin...

Sed vi vidas, ke ankaŭ al *vi*, kiu *ne* plu volis kredi, kion oni instruis al vi en via infaneco, estas donitaj la samaj, eĉ *multe pli sekuraj* bazoj de *konsolo* ol al tiuj, al kiuj ankoraŭ sufiĉas la kredo de ilia infaneco. –

Vi scias, ke mi certe komprenas la *doloron* pro tio, ke vi perdis la ĉeeston de amataj homoj en ilia tera formo.

Sed trans tiu doloro vere ne ekzistas kaŭzo por *funebro*, eĉ se la forpasintoj, post sia ŝanĝo de perceptomaniero, certe ne *tuj* spertas sin sur plej altaj spiritaj ŝtupoj, sed ankoraŭ devas labori *je si mem* en la *sama* maniero, kiel homo *sur tiu ĉi tero* devas labori je si mem, se li volas atingi en la spirito tion, kio jam *dum* tiu ĉi tera vivo estas *atingebla*, pri kio sciiĝas vin ĉiuj miaj libroj.

Krome, vi tute ne estas *spirite* apartigita disde viaj karuloj, kiuj devis forlasi la teran korpon!

En vi mem – en tio via *propra* spirita – vi restas *kunligita* kun ili, kaj se vi volas lerni aŭskulti en via *plejinterno*, tiam pli kaj pli doniĝos al vi la certeco, ke vi ankoraŭ *estas* en *spirita* interligo kun ili...

Sed gardu vin kontraŭ ĉiuj provoj voki la forpasintojn en la regionon de *videbleco* de tiu ĉi tero – en la regionon de la *eksteraj* sensoj!

Vi *ne povas* voki ilin mem!

Eĉ se vi konus ĉiujn sorĉajn formulojn de malsaĝaj nekromanciistoj de antikvaj tempoj, ili estas *fore malproksimaj* de vi *por viaj sensoj*.

Sed tio, kion vi *povus* voki, farus vin *la malsaĝulo en trompa arlekenaĵo*, kaj krome *alportus damaĝon* al la plej bonaj fortoj de viaj *korpo* kaj *animo*. –

Vi trovos detalan priskribon ankaŭ pri *tiuj ĉi aferoj* en miaj aliaj libroj, pri kiuj mi tie ĉi devas atentigi, se mi ne ripetu ĉion jam diritan.

Kiel vi povas trovi veran *konsolon* en vi, mi montris al vi.

Nun deturnu vin de via *funebro* pri *tiuj irintaj hejmen!*

Ili nun devas iri *sian* vojon, kiel *vi* la *vian*.

Levu vin por *nova komencado*, kaj se vi tiel volas trovi la vojon al la *spirito*, *nevidebla alta helpo* estos proksima ankaŭ al *vi* sur tiu ĉi tero: – la *sama helpo*, kiu nun kondukas viajn *formortintojn* al la lumo. –

Sed zorgu antaŭ ĉio, ke oni trovas vin konstante en la *amo!*

Nur tiuj, kiuj estas en la *amo*, povas trovi *gvidadon* tie kaj tie ĉi, kaj nur se la *reva regno de egoismaj deziroj forlasas* vin, vi eniros en la *amon*, kiu estas la plej alta *fonto* de ĉiu konsolo!

Fino

Esperanto-tradukoj de pliaj libroj
el la instrua verkaro de Bô Yin Râ
estas elŝuteblaj el jena retejo:
boyin-ra.org/esperanto/